
# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 6 Junio, 2017




*Karaj niaj Legantoj, eĉ nun, unu monato post la apero de nia jubilea numero, ni ricevadas interesaĵojn, ligitaj kun la nomo de nia bulteno. Koran dankon al ĉiuj sendintoj.*

*La pasinta kunsido de nia E-societo, kiun partoprenis du novbakitaj samideanoj, estis dediĉita al 500-jardeveno de Reformacio. Anstataŭ prelego, Hanso – estonta luterana pastro, proponis al atento de la ĉeestintoj sian novelon, ligitan kun la vivo de Martin Luter. Hodiaŭ – unua parto de la rakonto, la fino sekvos post unu monato (vd julian numeron).*

*Interesan informon ni ricevis el la orient-ukraina urbo Slo(a)vjansko, kie iam estis forta E-movado. Nun tiu ĉi urbo estis la unua, liberigita antaŭ kelkaj jaroj de kremlaj teroristoj. Iama eks-vic-prezidanto de UkrEA Dmitro Cibulevskij ekmemoras: "Pasis ege multe da tempo, tiuj memoroj pri agado de Universitato en Slavjansko elkapiĝu. Mi bone memoras, ke unue, estris ĉion Genadij Ŝilo, loĝinta tiuperiode en Slavjansk, tre favoris al tiu agado rektoro de la universitato, oligarĥo Feodor Poddubnij, ĉiuj studentoj nepre devis lerni la E-lingvon... Ŝildo sur la konstruaĵo, kie situis la universitato, estis en la rusa lingvo kaj E-o. Jen fakte ĉio, kio restis en la kapo". Mallongan raporton pri la lasta E-kunveno legu malsupre.*


*En ĉi numero – ankaŭ grava informo pri la tradicia E-pikniko. Nepre legu.Sanon kaj sukcesojn,*

–Viktoro-Redaktoro

## Iluminiĝo *de Hanso Becklin*

Ŝvitkovrite la monaĥo vekiĝis en ĉelo nenature malluma. Ordinare, li kalkulis je la lunlumo por konduki lin porden survoje al la fekejo, sed en la saksa ĉielo tiu flava bulo ne aperis ĉi-nokte. Ekde sia infaneco li timis la nokton, sed neniam povis dormi kun kandellumo dancanta sur la kalkitaj muroj de la ĉambreto. Nekutime, ne la bezono feki vekis lin, sed premsonĝo.

"Se Johano estus reveninta..." pensis li, ĉifante la litotukojn. Ĉirkaŭis lin la malluma ĉelo; li vidis nek la Virgulinon mure muntitan, nek la bretaron libre ŝarĝitan. Eĉ en mallumo la dorminto ne rimarkis la flagrantajn stelojn tra la eta fenestro inter la dikaj muroj. Ĉielen li kriis: "Gracia lumo, venu teren! Iluminu la homan sferon! Min ne turmentu plu!"



Li turniĝis en la lito. "Se Johano estus reveninta, mi povus nun konfesi miajn pekojn! Dio, kompatu vian filon! Mi perdiĝos!"

Subite li ellitiĝis. Li eĉ ne trovis muron de la ĉambro por apogi sian malfortikan korpon tiam, kiam angulo de kahelo kaptis unu piedon kaj faligis lin. "Damne!" Rampante sur la planko, li etendis siajn brakojn por trovi ion konatan. Neniam lia ĉelo ŝajnis tiel granda, kiel en tiu momento.

Lia manpinto finfine trovis muron, poste – pordon. Li uzis la anson por sin apogi; stariĝinte, li turnis ĝin. Malrapide li paŝis al la kandelingo meze en la koridoro. En la lumo li levis la orlon de sia tutnigra robo, kiu estis ligita per ŝnuro ĉirkaŭ lia ventro. La maldekstra genuo jam ŝvelis kaj ruĝiĝis dolore, sed ekde infaneco la monaĥo alkutimiĝis al korpa draŝado.

Ankoraŭ maltegite, la monaĥo memoris sian patrinon kaj ŝian devizon:

"Ni plaĉas al neniu
El ni, kulpiĝis ĉiu."

Eble liaj pekoj ja meritis la baton. Li rapide redeciĝis, kovrante sian ruĝan genuon kaj ĝian bonŝancan ĝemelon. El la kvaropo en la ingo li elektis unu kandelon, kies lumo kondukis lin reen. Li pensis, ke neniu rimarkos la mankon. Trio ja plaĉas al Dio.

Fronte al sia ĉambro, li eniris ĝin. La tenebro subite flugis for de la brulanta meĉo. Denove la ĉelo etetiĝis. Metinte la kandelon en la ingon apud la bildo de Sankta Maria, li falis sur la preĝbenkon. En la grandaj nigraj faldoj du genuoj tremantaj streĉis la drapon. Ne videblis, ke unu el ili ege doloris lin, sed scias ĉion la Dipatrino.☞

Li ĉiam adoris ŝin, sed ne sencele. Antaŭe, li diris siajn kaŝitajn celojn al Johano, kun skolastika precizeco. “Malsame al sia Filo kaj ties Patro, Maria scias mian homan malforton kaj povas kompatigi ĉi tiun pekanton. Eble ŝi flustros al la juĝanto pri mi pro la senĉesaj preĝoj, kiam alvenos la juĝa horo. Eĉ kolera Dio devas aŭskulti sian patrinon.” Johano simple kapneis–“Memoru, mia filo, ke nia Dio estas pardonema, indulgema, kaj kompatema. Kristo, sur sia kruco, forprenis viajn pekojn kaj redonis al vi puran gracon.” Tiam, kiam Johano estis ĉe la monaĥejo, li diris tiujn kvietigajn frazojn al la monaĥo pli ol ĉiutage, sed lia timo antaŭ Dio ne forflugis.

La kombinaĉo de timo kaj doloro ŝancelis lian trunkon duonhoron. Larmoj ŝprucis el liaj okuloj sur la krudan lignan benkon, sur kiu oni povis rimarki almenaŭ kelkajn spurojn de salo. Li kliniĝis, dolorigante sian batitan genuon. Sed oni eĉ ne povus senti tian doloron ene de la senĉesaj fajregoj.

Eĉ la aliaj profesoroj ĉe la univeristato ne komprenis lian streĉitecon, malgraŭ sia scio de la Skribo. Vilaĝcentre, ĉe la universitato, li ofte impetis kontraŭ siaj kolegoj: “Vi ne rimarkas la vojon antaŭ ni ĉiuj! Mi akceptos la juĝon, sed ne perdiĝos sen batalo kontraŭ la tentanto, kiu loĝas interne de mi. Vi ja konas lin persone, sed ne scias ĉi tion! Kaj nun vi pensas, ke la papo povas vendi deklaron al vi, kiu pardonigas vin sen pento! Kvitanco ne povas anstataŭi eĉ unu nepardonitan pekon kontraŭ Dio. Ĉu Dio deziras ĉiun oran moneron en Aŭgsburgo? Nepre ne! Kial tiaj gravus al Dio, kiu jam posedas la tutan teron kaj ĉiun kreiton?” *...daŭrigota...*

# E-renkontiĝo ĉe la Milit-Fronto

Jen ĝi finfine okazis – E-kunveno en Slovjansko, kiun partoprenis gesamideanoj el Kijivo, Lvivo, Melitopolo, Dobropilla kaj, certe, mem Slovjansko. Nomo de samideanoj, kiuj ekpovis aliĝi al ni de dume okupita Donecko, pro kompreneblaj kaŭzoj, restu kaŝitaj.

Fakte, ni sukcesis fari ĉion planitan: vizitis lavron en Svjatogirsko, keramikan merkaton kaj salajn lagojn. Malgraŭ ne tro varma vetero, kuraĝaj esperantistoj testis ĝiajn kuracigajn kapablojn proprakorpe. En ado de kunveno ni ankaŭ partoprenis la “rondan tablon” en centra urba biblioteko, kie renkontiĝis kaj komunikis kun lokaj esperantistoj – membrojoj de esperanto-klubo, funkciinta en Slovjansko dum 1980-j jaroj. Krom tio, nia grupo transdonis al biblioteko kelkajn librojn, kolektitaj por slovjanskanoj je formato de volontula alvoko. Inter aliaj tie estis tute freŝa eldono – libro de svedia ĵurnalisto Kaale Kniivila “Homoj de Putin”, tradukita el esperanto pere de kijivanoj.

Kunvenante en Slovjansko ni ne povis preterpasi temon de ruse-ukraina milito. La programo de renkontiĝo enavis eblecon ekskursi al lokoj de aktivaj bataloj, kie nun estas memorialoj je murditaj ukrainiaj herooj (*sur la apuda foto: ŝildo kun nomo de la urbo, traigita per kugloj de kremlaj malamikoj*).

Tri tagoj trapasis rapide. Estas espero, ke partoprenintoj la kunvenon konvertumos promesojn veni Slovjanskon reen en bonan ĉiujaran tradicion.

Statistiko: en Slovjansko okazis la unua e-renkontigo dum periodo de sendependa Ukrainio (la lasta estis fine de 1980-j jaroj). Unu novulo debutis en komuna esperanta-aranĝo; du spertulinoj renkontiĝis post 27 jaroj; vizitis Slovjanskon unuafoje tri esperantistoj. *–Paŭlo Korotenko (speciale por* “Saluton!”)

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105


## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko sur la 6-a (sesa) etaĝo norda stud-ĉambro: 400 S. State St., Ŝikago.

**18an de Junio, 4-a ptm, en la “Promentory Point Park”** – Tradicia Somera Pikniko

**25-an de Julio** – pri Kaliforniaj Vitejoj Rakontas Araneo

**22-an de Aŭgusto** – UK en Seulo per Okuloj de S-no Leszek




# Grave: Pikniko’2017



Nia tradicia pikniko okazos la 18an de Junio, inter mateno kaj 4-a ptm, en la “Promentory Point Park”, kiu okupas duoninsulon en bela najbarejo Hajdparko. De la parko oni povas vidi la urbocentron, kaj belega strando (tiu ĉe 57a strato) troviĝas sude de la duoninsulo, por tiuj, kiuj volus sunbruliĝi aŭ eĉ trempiĝi. Estas granda publika aŭto-parkejo ĉe la 55a strato. Pago: $1/hore (eble iomete pli, ĉar la prezo dependas de la tago kaj horo). Tiu, kiu volas ŝpari tiun bagatelon, povas parkumi sur la stratoj proksimaj. Oni povas uzi bus-itineron n-ro 6, kiu veturas de la urbocentro rekte al Hajdparko senhalte: elbusiĝu ĉe la haltejo “S. Hyde Park & 55th St”, kiu estas nur kelkaj paŝoj de la parko mem. Organizantoj provizos kolbasojn, bulkojn, kuiros multe da terpomsalato. Elspezoj estos dis’dividataj inter ĉiuj partoprenantoj. Bv preni trinkaĵojn (akvo, biero, vino, viskio) laŭ via gusto kaj ŝato. Ankaŭ informi Hanson Becklin (ĝis la vendreda vespero, 16-a de Junio, aŭ sabata mateno, 17a de Junio) pri via partopreno (kaj kvanto de viaj amikoj) telephone: 608-957-6457 aŭ rete: hebecklin@gmail.com, tiu ĉi informo gravas! Dankon!

*–Organiza Komitato*